

KISVÉI KÖNYVTÁR
SÁLGÓTÁRJÁN



89/4. * 16,- Ft

HUNGARA VIVO

Prokrusta lito

Angla Antologio II (1800-1960). Redaktis: d-ro Albert Goodheir. Eldonis: Biblioteko Montagu Butler, Esperanto-Asocio de Britujo, Londono, 1987. 432 p. 22 cm. ISBN 0 9513268 05. Prezo: 34,50 gld. (Por Hungario: 650 forintoj.)

Longe lasis sin atendi la dua parto de la Angla Antologio, kiu traarkas la periodon inter 1800 kaj 1960 kaj kronas la Grand-Britian triptikon, konsistantan el du anglaj kaj unu skota antologioj (ĉi lasta aperis en 1978). La unua volumo eliris jam en 1957, kaj malgraŭ ĉiuj siaj meritoj nur malrapide vendiĝis, kvankam William Auld, animanto kaj motoro de la laboroj poste tuj engaĝis sin energie por la daŭrigo — kolektante, korrektante kaj instigante.

Ne enviindas kompilantoj de antologioj de grandaj literaturoj, ja dum la leganto volonte prenas en la manon ajnan bukedon el verkoj de nekonata literaturo — kun la freŝa interesiĝo al malkaŝotaj valoroj —, li antaŭkonceptas preferojn kaj postulojn al jamaj konataĵoj. Al tia pretendemo ne „vendebblas” io ajn, dorlotatoj ja elektemas.

Jam la unua nepra demando: Kio konsidereblas angla literaturo — ne facile respondeblas. Oni ja verkas angle plurloke en la mondo, aliparte ekzistas en Grand-Britio riĉa kimra literaturo kaj iom da gaŝa en Skotlando kaj Irlando. Komplikas la bildon ankaŭ la fakto, ke ekz. la angle verkanta G.B. Shaw estis irlandano, Dylan Thomas kimro, Thomas Carlyle skoto. Troviĝas aŭtoroj, vivintaj daŭre ekster Anglio aŭ neangloj, vivintaj longe en Anglio. William Auld selektis laŭ la ĝenerale akceptita kaj — mi kredas — sole racia koncepto: angla estas ĉio, verkita en la angla en Britio kaj Eĵro.

Sed ĉi tiu selektado havas du dolorajn manojn, kiujn Marjorie Boulton prieŭfemismas en sia antaŭparolo kiel necesajn limigojn. Pro la altaj kostoj de kopirajto oni devis ekskludi verkojn de la nuntempo, kaj pro spacomanko la dramojn. Pri la unua kialo mi lasus min konvinki, sed ĉu prezentebblas karakteriza angla literaturo sen dramoj de O. Wilde, W.B. Yeats, G.B. Shaw, T.S. Eliot, S. Beckett kaj Osborne? Akompante de antaŭ- aŭ intertekstaj klarigoj dramfragmentoj kapablas ja montri kohereajn tutojn, „marojn en gutoj da akvo”, vidu la ekzemplon „Angla Antologio I”!

Spite al ĉi tio apenaŭ troviĝus gusto, kiu ne havus la sian en ĉi tiu kolieroj de brilaj britaj perloj. La poezian parton de la volumo malfermas la du elstaruloj de la aŭtoro de la romantikismo, la „lagaj” poetoj W. Wordsworth kaj S.T. Coleridge, prikantantaj la mirindaĵojn (wonders) de la vivo el kontraŭaj aspektoj: Wordsworth tiujn en la ĉiutagaj fenomenoj de la naturo („Preludo”) kaj lia amiko tiujn de superrealaj okazaĵoj, kamufliitaj en realecaj



vestoj („Versoj pri l' maljuna maristo”). Verkoj ne facile konkereblaj por la kompreno, sed kun mirinda interna mondo.

La duan grupon de romantikuloj reprezentas en la volumo Byron per „Do, ne plu ĝis nokta horo” en la glata traduko de Auld, fragmentoj el „La pilgrimo de Childe Harold” kaj „Don Johano”; P.B. Shelley per „Odo al la okcidenta vento”, „La indiana serenado” (en la traduko de Kalocsay) kaj la granda primiranto de la belo, John Keats per tri odoj (al najtingalo, greka urno kaj melankolio) kaj kelkaj malgrandaj, sed ne minoraj poemoj. Legante ilin mi emas diri M. Boulton prava pri ŝia plendo pro spacomanko, demandante min samtempe, ĉu la kolekto ne fariĝus pli angla per la elŝparo de kelkaj malpli gravaj poetoj (J. Clare, Th. Hood, C. Patmore) kaj plifavorigo de majoruloj? Aŭ prosuferus la varieco, bunteco de la gamo? Eble, demando de gusto, sed mi ne povas ne lamenti pri la komplete manko de la nuntempa poezio. Ĉi tiu parto ja finiĝas per Chesterton, Thomas, Hulme, Lawrence, Brooke kaj Owen, ekvidintaj la mondon en la Viktoriana epoko!

Ankaŭ la proza parto ne abundas je samtempuloj, se ne konsideri J. Masfield kaj Edna O'Brien. La specimeno de ĉi tiu lasta (el „La kamparaj junulinoj”) estas cetere la febla ĉenero de la antologio, koncentranta en si abundon da mispresajoj kaj ĉiujn ekzemplojn pri gramatikaj misŝtonoj, je kiuj angloj povas stumbli („ĝi” anstataŭ „tio” kaj inverse pro la misloga „it”; nediferencigo de

transitivaj/netransitivaj, reflektivaj/nerefleksivaj verboj; „trans” por „tra”; necerteco pri akuzativo, sama vorto kun alia senco en la angla. Ĉu dormetis la bona Homero, A. Goodheir?

Feliĉe, ambaŭ koboldoj nur malofte misŝercas en la cetero de la antologio. Kaj la gamo de frandaĵoj estas tiel vasta, ke oni volonte fermas la okulojn pri tiuj kelkaj neglataĵetoj.


La vicon malfermas la eseisto Charles Lamb per sia instrua kaj amuza „Plendo de fraŭlo pri la konduto de geedziĝintoj”. La juda ĉefministro Disraeli rerakontas la aventuron de la impertinenta Tesalia reĝo lksiono sur Olimpo — historio cetere ne sen salo kaj saŭco, tamen se pensu pri ĉi tiu Prokrusta lito de anglaj aŭtoroj, mi pledus agite por la amara-pinĉa realisto Thackeray aŭ la modelkreinto de la historia romano Walter Scott, por kiuj eĉ sokleto ne metiĝas en ĉi tiu brila panteono. Dickens, la pli feliĉa samtempulo ankaŭ ĉi tie pli bonŝancis per tri fragmentoj el „Rakontoj pri du urbejoj”, „Bleak House” kaj „David Copperfield”.

Eĉ plej splenan temperamenton agitus la du ĉapitroj el la eble plej bona historia romano de tiu tempo „La klostro kaj la kameno” de Charles Reade en la leĝere glata traduko de M. Boulton. Kaj ĉi tie mi devas halti por grumbleti: kia bezono ĉifri la nomojn de tradukintoj je unu ĝis du minuskloj, devigante la dankeman leganton al longa serĉado post tiel eminentaj nomoj, kiel W. Auld, M. Boulton, K. Kalocsay, Kris Long, L.N.M. Newel, Reto Rosetti, L. Tárkony ktp.?

De la konservativa A. Trollope ĝue mi legis la psikologie zorgeme nuancitan scenon pri la interpuŝiĝo de la parafestro Crawley kaj lia episkopo el „The Last Chronicle of Basset”. W. Auld prezentas al ni la frenezan tefeston kaj la historion de la Ŝajnekolonio al la tre ŝatata kaj konata „La aventuroj de Alica en Mirlando” de L. Carroll. Sed volonte mi elŝparas la ŝtatan ĉefpoeton kaj ofte siropan John Masfield — kiun la preskoboldo sugestis misŝribi kiel Mansfield — favore al la vera Mansfield Katherine, kies delikate fajnaj virinripentroj kaj pli-ol-Ĉeĥovaj noveloj pli fierigus la anglojn, eĉ se ŝi venis el Nov-Zelando.

La imponan vicon kompletigas specimenoj el la verkoj de R. Garnett, S. Butler, Th. Hardy, A. Conan Doyle, H.G. Wells, A. Benett, H.H. Munroe, James Joyce kaj J. Galsworthy (ĉi lasta kun fragmento el la unua romano de Forsyte-Saga, famiĝinta per la samtitola filmserio).

M. Boulton skribis skizan konigon pri la epoko kaj unuopaj verkistoj, „rondigante” la antologion, kiu estas valora trezorejo aŭ ŝatinda guto el la maro de la angla literaturo. Mi volonte diras kun kaj per Wordsworth, staranta sur la Vestminstra ponto: „Nur la animo prema kaj obskura ne haltus rave ĉe la vido nura.”



NE ESPERANTISTO!

- Kien vi iras, amiko, tiel nerveze?
- Hieraŭ iu donacis al mi belan apudlitan lampon por legi.
- Pro tio ja ne indas nerveze vagadi surstrate!
- Sed jes! Ĉar mi tute ne scias, kian libron mi aĉetu al ĝi.

NE EN HUNGARIO

- Grandioze! – ekkrias viro enpaŝante en la lageton – tiu akvo feliĉe ne estas tro malvarma. Bonvolu diri, sinjoro, ĉu tiu akvo bonvenas al reŭmatismo?
- Tutcerte! – respondas la alparolita vilaĝano. – Ankaŭ mi akiris ĝin de tiu akvo.

NE VIA AMATINO...

- esprimis – ĉu ne? – la deziron disiĝi kaj forlasi lin.
- Sed kial, karega Eva? – li demandis – ĉu senespere??
- Ĉar mi ne povas dormi pro la konscienciproĉo, kiun mi sentas pro via edzino...

NE NIA KURACONTO...

- ricevis la demandon dum ekzameno de profesoro:
- Kiom vi donas el tiu medikamento al la paciento?
- Nur ses gramojn, sinjoro profesoro – venis la respondo senhezite.
- Post unu horo la studento ekscitite revenas, kaj petas permeson ĝustigi: – Pardonu, profesoro, ses gramoj estas troa dozo...
- Ĝustigi vi volas, ĉu? Via paciento jam mortis antaŭ duonhoro!

NE DEMANDU KELNERON!

- Diru, kelnero, el kia viando prepariĝis tiu aĵo?
- Nu, el hakitaĵo, sinjoro.
- Ĉu vere? El hakitaĵo, vi diras. Ĉu el hakita paservando, ĉu?!

MAKDIKIĜO VIRA

- Kiam mi edziĝis, mia elekto aparte celis mian stomakon.
- Ah, do vi elektis bonege kuirantan virinon!?
- Tute male! Mi volis maldikiĝi sen gimnastikado, tial ŝi devis esti malbona kuirantino. Kaj mi sukcesis jam perdi almenaŭ dudek kilogramojn, Vidu, kiel bone mi trafis ŝin!

GAJA PAĴO



...KAJ VIRINA

- Mi ĝojas sinjorino – ridetas gvidantino de maldikiga kurso – ke vi jam malpeziĝis je kelkaj kilogramoj. Vi povas jam uzi pli malgrandajn vestojn, ĉu ne?
- Tute ne – diras la junulino – sed almenaŭ miaj vestoj malpli turmentas min.

PROMESO VIRA

- Karega Karlo, almenaŭ promesu, ke apud mi vi dekutimiĝos de la ĉiama drinkado...
- Kompreneble, karulinjo, ĉar mi certe ne apud vi drinkos!

MEMORO VIRA

- Terure, kiel vi aspektas ĉi-matene – grumblas pikeme la edzino. – Tamen mi ŝatus scii, kie vi estis ĉi-nokte?
- Ankaŭ mi! – venas la dormema respondo.

PROMESO INA

- Hu! Kion vi faras? – kriegas paciento de dentistino. – Kiun vi ĵus eltiris, estis ne mia doloriga dento!
- Trankvilon, sinjoro! – kvietigas la doktorino. – Venos la vico ankaŭ al tiu.

MEMORO INA

- Ho, mia karega! – ĝojas amikino renkonte. – Mi aŭdis ke vi denove edziniĝis. Nu, kiu li estas?
- Atentu pormomente, mia kara. Mi tuj trovos lian vizitkarton en mia sako.

DIMANĈE KION...

- vi faros, Rozinjo? – demandas la ĉefo ĉarman oficistino.
- Nenion, sinjoro direktoro – ŝi respondas kun kreskantaj esperoj.
- En ordo, Rozinjo. Sed mi atentigas vin: hodiaŭ estas merkredo.

DENOVE PRI TAGOJ

- Lunde matene la direktoro turnas sin al la sekretariino:
- Ni rigardu la farendojn. Kio estas registrita en mia kalendaro por la semajno?
- Lundo, mardo, merkredo – respondas ŝi servoprete.

Ervin Fenyvesi

Pri Sándor Kőrösi Csoma

aperis biografio tradukita de nia kunlaboranto, Ervin Fenyvesi, antaŭ kelkaj jaroj. Nun la konata E-pedagogo, d-ro Ferenc Jáki poemon verkis pri la fama mondvojaĝanto. Ni citas la du lastajn versojn en la linioj: H.2. kaj V.1. (ensendendaj linioj).

La poemo aperis eĉ en du eldonaĵoj: en dulingva poemaro kaj en „Legindaj legaĵoj”, eldonitaj je la sepdekjariĝo de d-ro Ferenc Jáki, kiun ni aparte gratulas.

Limdato: du monatoj post al alveno de la revuo.

Horizontale: 15. Okupi la antaŭan lokon, 16. Ne povi ne fari ion (R), 17. Antaŭnomo de franca verkisto Franca, 18. Digna, meritanta ion, 19. Masiva, firma(R), 20. Satira, plena de moko, 21. Reen: tabelvorto, 22. Pezmezur' por diamantoj, 23. Tuto de disĉiploj(R), 24. Prepozicio, 25. Sufikso por kolektaĵo, 26. Kriplaj je kruro, 27. Malgranda ronĝulo, 28. Komenco de V.6., 29. Malutilaĵ, 31. Akva vegetaĵo, 32. Ornami teksaĵon per fadeno(R), 33. Oficialan tabelon (liston), 34. Interpunkcia signo, 35. Fama germana poeto, 36. Motoron de viva korpo, 37. Grava germana poeto, 38. Motoron de viva korpo, 37. Grava germana poeto, 38. Motoron de viva korpo, 39. Preskaŭ H. 36! 40. Heroino de Ibsen, 41. Reen: vertikala dimensio, 42. Reen: komparativo, 43. Filmarto, 45. Insekto, 47. Mallongigo de fifama franca (Alĝeria) terortatenco, 48. Japana havenurbo, 50. Identaj konsonantoj, 51. Virina nom', 53. Loĝanto de Nord-Eŭropa lando, 54. Doni manĝi, 56. Hungara esperantista verkisto, 57. Tiel finiĝas fabelo(!), 58. Enirkarto(R), 59. Satelito de Tero, 60. Parto de Amuro(!), 61. Interjekcio, 62. Persona pronomo, 63. Reen: konsonanto, 64. Virina elstaraĵo, 65. Numeralo, 66. Floro-strukturo similanta vergojn de ombrelo, 67. Evente, 71. Devizo, gvidfrazo, 71. ...talo: la valo de prahomoj, 74. Instrumento, 75. Scioj,

Vertikale: 2. Maŝino por produkti elektron, 3. Montri subitan gajecon, 4. Spec' de papag', 5. Persona pronomo, 6. Estimado kiel dion, 7. Bone lumigataj, 8. Peni ne renkonti iun(R), 9. Vokaloj de nia heroo, 10. Speco de agato, 11. Emblemo de ludkartoj, 12. Koralsinsulo ringeca, 13. Elektre ŝargita atom', 14. Epepeon de Homero, 19. Identan, 22. Kradan „loĝejon” de birdoj, 23. Varmiga astro, 26. La ĉefa noto de skalo – kun artikolo, 27. Kiel H.64. 28. Solo en opero, 30. Loĝanto de Nord-Afrika lando, 31. Unu el la pseŭdonomoj de Kálmán Kalocsay, 32. Alportanta di-favoron, 34. Firma moralo, 35. Ekzemple kloro, bromo, 37. Reen: numeralo, 38. Antaŭbrusta osto, 40. Fino de H.31. 41. Reen: membro, 42. La solecaj piuloj –

| | | | | | | | | | | | | | | | |
|----|----|----|----|----|----|----|----|----|---|----|----|----|----|----|---|
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | R | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | D |
| 15 | | | | | 16 | | | 17 | | | | | | | |
| 18 | | | | 19 | | | | 20 | | | | | | | |
| 21 | | | 22 | | | | | 23 | | | | | 24 | | |
| 25 | | 26 | | | | | 27 | | | | | 28 | | | |
| 29 | 30 | | | | | 31 | | | | | 32 | | | | |
| 33 | | | | | 34 | | | | | 35 | | | | | |
| 36 | | | | 37 | | | | 38 | | | | | | P | |
| 39 | | | | 40 | | | | 41 | | | | | 42 | | |
| R | 43 | 44 | | 45 | 46 | | | | | | | 47 | | | |
| 48 | 49 | | | 50 | | 51 | | | | | 52 | | | | |
| 53 | | | | 54 | | 55 | | | | 56 | | | | | |
| 57 | | | 58 | | | | | 59 | | | | | | 60 | |
| 61 | | 62 | | 63 | | 64 | | | | | | | 65 | | |
| 66 | 67 | | | 68 | 69 | 70 | | | | | | 71 | | | |
| 72 | | | | 73 | | 74 | | | | | 75 | | | | |
| G | | | | | V | | | | | | | | | | ! |

kun artikolo, 44. Fino de fino! 46. Kare ŝati, 47. Komenco de nia aŭdorgano, 49. Filino de Herodiasa (heroino de R. Strauss-opero), 50. Ĝena insekto, 52. Afero de V.46., 54. Persona pronomo, 55. Parto de parto! 58. Spegulaĵo surmura, 59. Longa ŝnuro por kapti bruton, 62. Proksimiĝi, 64. Kontraŭe, 65. Pagilo, 67. Obstakl', 68. Reen: plenda krio, 70. Se ne vi, tiam...? 71. Ĝenerala kutimaro(R), 73. Finaĵo de H.54., 75. Kortbirda duono!

I. Z.

Solve de la krucenigmo en la n-ro 1989/1:

„Ke mi ne vidos cin plu en ĉi mondo,
Ne trovos guston en la fea forto
De l'am senzorga; – tiam sur la bordo
De l'vasta mondo staras mi pensante,
Dum amo, fam' nenien sinkas lante.

(John Keats)

Premion gajnis per lotumado:

S-ino Ines Kraus, Leipzig, GDR; s-ino Tatjana Kulakova, Sverdlovsk, SU; s-ro Cvi Löwenkopf, Maagan, Israelo.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

La laŭta vekhorloĝo
Kaj aliaj atentokaptiloj

de Stefan MacGill

Rakontojn, rolludojn, enigmojn kaj aliajn stimulajn porrekzercajn tekstojn enhavas tiu ĉi nova libro de Stefan MacGill.

1. Kiu estas la heroo de la rakonto „La unua vekhorloĝo”?
2. En la rakonto „La heroo” ekflugas milita aviadilo

de lando Pacamio. Kiel nomiĝas la najbara lando?

3. Kion signifas la mallongigo KREVO?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solve de la demandoj en la n-ro 1989/1:

1. Strato Danubo n-ro 16, en Somkút.
2. Morfino, krome Donalgin, Dolorgan, vitaminojn.
3. Pastro Murányi havis ĉ. 50 jarojn.

Premion gajnis per lotumado: s-ro David Curtis,

Weston-s-Mare, GB; s-ro Medgyes Béla, Budapeŝto, H. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

Redaktorino Krystyna Burlinska (42) pri turismo, teatro, Hindio. *Rzeszów*, Str. Sienkiewicza 12/85. PL-35-201. — Piloto, teknikisto Wieslaw Klak (25) pri turismo, fotado. *Lancut* Wys. Lancucka 153, PL-37-100. — Kom. ekonomikisto Wang Yongping (29) pri literaturo, geografio, fotado, filatelio, belarto, ankaŭ inters. ktm. Qingnian-Xiang 1, *Neijiang*, Siĉuan prov. Ĉinio 641.000. — S-ro Stanislav Jur. *Mehničev* (31) invalido facile, ŝatas turismon, fiŝhokadon, librojn. *Kirov* ul. Maklina d46/39. SU-610035. — Lernantino Ewa *Wotczyk* (19) pri muziko, kol. kasedoj. *Wodzislaw* ul. 26 Marca 27/31. PL-44-300. — S-ro Mariusz *Korzewiewski* (19) pri muziko, literaturo, *Gozdowo* str. Dworcowa 9, PL-09-213. — S-ino Krystyna *Skalkiewicz* (38) teknikistino pri konstr., pĉt. *Sanok* str. Traugutta 21/26. PL-38-500. — Instruistino Malgorzata *Stefanik* (26) pĉt. *Rzeszów* str. Staszica 31/12. PL-35-051. — S-ro *Georgo Tomaszewski* (23) pri tur., geografio, sporto, literaturo, kol. bk. *Tyrawa Wot.* Hotuczków 50, PL-38-535. — Lernantino *Nomeda Vilkelytė* (17) ktm, pri literaturo, kol. bk, kalend. *Jonava* Chemiku 35-6, Litovio SU-235.000. — Inĝ. *Jakub Šamšiev* (32) en H kaj Eŭropo serĉas amikojn, kol. E-libroj, poŝkalend., reklamrevuoj, katalogoj de hejma meblaro k.s. Resp. garant. *Samarkand* Glavpoĉt. Pĉ. 30. SU-703.000. — Oficisto *Ma Haibin* (27) ktm, pri div. kaj literaturo, lingvoj, kol. pk, pm, fotoj, E-aĵoj. *Zhengzhou* Zh. Reserĉ-Instituto Automacia, Henan prov. Ĉinio. — S-ino *Zofia Baranska* (34) farmacistino, pĉt. *Rzeszów*, Al. Wielk. Proletariatu 18/7. PL-35-328. — Heino *Tohv* (37) fraŭlo, E-instruisto pĉt. ktm, kol. pm, kalend., bk pri naturo/urboj. *Pärnu* str. Männiku 10. Estonio SU-203.600. — S-ro *Zbigniew Siekierski* (33) pri filmo, akvario, historio, kutimoj, antikvaĵoj, kol. bk, diapoz., gvidlibroj. *Radom* ul. Sakowska 13m8, PL-26-600. — S-ro *Sergej Bondarenko* (25) pri muziko, aŭtoj, kun amikoj, rec. gastigo eble. *Gabrovo* str. Vidima 19, BG-5300. — Inĝ. *Ziaja Kazimierz* (37) pri vivo, politiko, motoro, filmo, inters. sondisko/kasedoj, bk. ktm. *Olkusz* str. Skalaska 14/22, PL-32-300. — Farmaciistino *Irena Blechinger* (40) pri literaturo, ĝardeno, infaneduko. *Rzeszów* str. Podwislocze 8/94. PL-35-310. — Flegistino *Urszula Królikowska* (41) pĉt. *Sanok* str. Dembowskiego 7/27, PL-38-500. — S-ro *Henryk Andreasik* (30) pĉt, pri agrikulturo, vojaĝoj, vizitoj, kol. pm. *Jawor* ul. Wroclawska 33, PL-59-400. — Junulo *Vadim Ĉajkin* pri naturismo/nudismo, historio, orienta kulturo, jogo k.s. Kol. bk, libroj, E-filatel. *Ĉurupinsk-1*, Pk. 24. SU-326.520. — Studentino *Alicja Sieracka* (24) pri muziko, turismo, pentro, fotado, kol. bk. *Bielsko-Biala* str. Skosna 14/9, PL-43-300. — F-ino *Bozena Sudek* (20) ktm, *Mielec* ul. Kusocinskigo 19/78, PL-39-300. — S-ino *Dalia Grumadienė* (30) pri muziko, literaturo, turismo. *Kaunas* Vilniaus 41-4, Litovio SU-233.000. — S-ino *Lili* (22) kol. naturistajn revuojn, librojn, bk, pri korpo-artoj, tekn. estetiko. Lian sheng jie 2, *Changsha* Hunan prov. Ĉinio-410.005. — Konstrukiistino *Wieslawa Nosek* (33) pĉt. *Lancut* Osiedle XX-lec. 13/3. PL-37-100. — Oficistino *Danuta Maziarz* (31) pĉt. *Przeworsk* str. Staropocztowa 1, PL-37-200. — S-ro *Sergej Porasĉenko* (21) pri muziko, foto, fiŝhokado, turismo, kun anglo, germano, ja-

pano. *Gomel* Kirova 133/50. SU-246.030. — *Neijiang-a Esp.-Asocio* (NEA) kaj anoj kun ges-anoj kaj organizoj tm pĉt., inters. E-eldonojn, pm, pk, foto k.a. NEA ĉo LES LO, *Neijiang* Constr. Bank, *Neijiang* Ĉinio 641.000. — S-ino *Maria Spera* (50) ktm. *Kutno* ul. Staszica 7a-m5, PL-99-300. — S-ino *Teresa Szczypkowska* (32) pĉt. *Konin* ul. Lipca 19/34.

LETERKESTO

S-ro *Kurt Greutert*, Giubiasco, CH: Eĉ se nur foje-foje vi prenas plumon por rimarki ion pri nia revuo, estu certa, ke ni ĉiam konsideras tion serioze en nia redakcio. Pri la novaj eventoj kaj ŝanĝiĝoj en Hungario ni daŭre klopodos kiel eble „koncize kaj klare” prezenti bildon; ja ni bone scias, ke en multaj landoj niaj legantoj forte atendas tiaspecajn resumadojn kaj klarigojn. Agrablan feriadon!

S-ro *Jaroslav Marik*, Praha, CS: Nia leganto, honora membro de CEA, multe ĝojis legante la laŭdajn rememorojn pri la iama Verda Stacio de Brno. Tia reeĥo al nia artikolo (Revuo de revuoj, en n-ro 89/1) tuŝas nin ĉiam agrable, ankaŭ instigante por malvualigi pli ofte home movade indajn memoraĵojn el nia centjara pasinto. Menciindas cetere, ke ni havis nenian konon pri ies kurioza rifuzemo koncerne tiun etapon de la Eaj radioprogramoj, ververe ni eĉ ne komprenus tian malaprobbon. Pri la vortserco: ni sentas nenian ĝenon pro diraĵo el la speco „hungara-ĉungara”.




S-ro *Jozefo Major*, Wellington, Nov-Zelando: Via informo, grave plenda, pri la malsuprenlito de la Novzelanda ekonomio, montras al ni tiajn aferojn malagrablajn en via insula lando, pri kiuj meze de Eŭropo oni fakte scias nenion. Ŝajnas, ke malgraŭ la ega distanco, ekonomiaj problemoj povas aperi preskaŭ similtaniere, ĉar la moderna ekonomio sur la ŝrumpiĝanta Tero formas unusolan komplekson. Diverseco de la reĝimoj — videble — tute ne kontraŭis, ke ankaŭ ĉe vi alte amasiĝu ŝuldoj de la ŝtato, kaj paralele la ekonomia nivelo suferu timigan falon kune kun abruptaj prezaltiĝoj. Sukcesajn prelegojn dum via vojaĝo en Japanio!

★ HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik • Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk • H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoŝtatoj, ĉe la gazetkolektistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. •

Indeksám: 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

KUNORDIGA LIGO de
MEDIO-kaj
NATURPROTEKTADO
en DEPARTEMENTO
KOMÁROM




adreso:
Tata,
Váralja u. 2


MAVICELL^R

ORIGINALE NATURA

multrilate bone uzebla varogrupo de celulozoperloj



Medioamika



Produkta:

Magyar Viscosagyár – Hungara Viskoza-Fabriko

H- 2537 Nyergesújfalu

Telefono: (06-34) 16-122

Telekso: 22-5626

Telefakso: 10-076

1989 SEP 14